**n°496 | Junio 2024**

**Karaj abonantoj, bonvenon! Jen via monata raporto pri projektoj, eventoj, kaj iniciatoj de junaj esperantistoj el ĉiuj kontinentoj.** Majo estis granda kaj grava monato por TEJO: la unua epizodo de nia serio Esperanto Senlime fine disponeblas! Jam miloj da homoj spektis la komencon de la aventuroj tra Eŭropo de niaj 17 steluloj. Ĉu ankaŭ vi? Abonu niajn kanalojn kaj kunhavigu la serion kun viaj amikoj por montri la povon de Esperanto!

Parolante pri steloj, nepre legu ĉi tiun eldonon ĝis nia horoskopo, kiu provizos vin per inspiro por helpi vin navigi la ĉielajn influojn dum ni eniras la duan duonon de la jaro 2024. **Sed memoru, la steloj nur montras la vojon, kaj vi mem elektas la direkton. Do, sen plua prokrasto, ĝuu la legadon kaj ĝis la venonta!**

Kadre de la internacia seminario pri multikultureco kaj migrado, partoprenantoj havis la oportunon intervjui homojn kun malsamaj migradaj fonoj por lerni pli pri la multaj aspektoj de migrado. **Nova intervjuo aperos ĉiusemajne, rigardu jam la unuajn du!**

En la **plej nova numero de *Kontakto* (318)**, malkovru pensigan tekston pri la intensiĝo de mensaj malsanoj ĉe junuloj, legu pri la interna vivo de figoj, novaj videoludoj, okazaĵoj en Esperantujo, kaj multe pli!

**Malkovru freŝnovan akustikan pop-rokan albumeton “Ruinoj” de Martin & la talpoj.** Por tiuj kiuj konas la muzikon de Martin, la stilo de ĉi tiu albumeto certe estas bone rekonebla. Aŭskultu fragmentojn kaj aĉetu plenan albumon ĉe la vendejo de Vinilkosmo.

En Junio, eŭropaj balotoj okazis en ĉiuj membroŝtatoj de la Eŭropa Unio. Por promocii tion, la evento LevelUP! estis organizita de Forumo Junulara Eŭropa en Bruselo (Belgio) en Aprilo, kaj TEJO sendis sian propran delegacion. **Legu la raporton de Vuk Mladenović!**

# Malfermaj alvokoj

Ĉu vi pretas labori por kaj kun Esperantujo kaj volas kontribui al la bonfarto de nia organizo, en la koro de la Esperanto-movado? **Iĝu volontulo en la Centra Oficejo de Roterdamo en 2024-2025! Ni akceptas kandidatiĝojn ĝis la 30-a de Junio.**

**Aliĝu al nia teamo kaj kontribuu al la antaŭenigo de la junulara Esperanto-movado!** La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn al la Estraro por la mandato 2024–2025. La Estraro estas la ĉefa plenuma instanco de TEJO kaj konsistas el maksimume 9 estraranoj. **Kandidatiĝu ĝis la 30-a de Junio.**

**La 1-a de Aŭgusto 2024 estos oficiĝtago de nova Komitatano C de TEJO.** Komitatano C en la Komitato (la supera organo de TEJO), reprezentas membrojn de la kategorio Junaj Amikoj de Esperanto, kaj **ni bonvenigas kandidatiĝojn ĝis la 1-a de Julio.**

# Internacia Junulara Kongreso 2024

**La organiza teamo invitas vin proponi vian programeron por la taga programo de IJK 2024.** Ne gravas, ĉu vi jam kutimas gvidi programeron aŭ unuafoje gvidas grupon: sendu al ili viajn ideojn kaj proponojn kiel eble plej rapide por sekurigi vian preferatan spacon en la programo!

Krome, la organiza teamo ĉiam serĉas homojn, kiuj volas ĝui la kongreson kun rabato, esti kerna parto de la kongreso kaj iomete laboreti! **Ĉu tio sonas kiel vi? Iĝu helpanto!** Legu pli da informoj en la retejo kaj aliĝu al la teamo!

Dum la kongreso vi havos eblecon ne nur konatiĝi kun esperantistoj de la tuta mondo, sed ankaŭ viziti diversajn gravajn lokojn apud la kongresejo. Ĉu vi iam vizitis marĉon, la muzeon de malvarma milito, partoprenis en boatado kaj kajakado? **Spertu Litovion kaj aliĝu nun, ĉar lokoj rapide elĉerpiĝas!**

**Dum la kongreso vi povos aŭdi plurajn koncertojn de esperantistoj kaj lokanoj.** Aŭskultu nun la kantojn de tiuj, kiuj vigligos viajn vesperojn kaj prepariĝu ĝui la koncertojn dum la kongreso!

# Venontaj eventoj

Filipina Esperanto-Junularo lanĉas sian novan eventon, **FAJRO**, kiu okazos en la urbo **Quezon (Manilo)** la **27-an de Julio**, por festi la Esperanto-Tagon. FAJRO estos la plej granda evento de filipinaj esperantistoj ĉi-jare, kaj vi estas invititaj! Trovu detalan informon en la nova retpaĝaro.

La 109-a **Universala Kongreso** de Esperanto okazos en **Aruŝo (Tanzanio)** inter la **3-a kaj la 10-a de Aŭgusto** 2024. La temo ĉi-jare estas “Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo”. Aliĝu kaj trovu ĉiujn informojn ĉe la retejo de la evento.

La 80-a **Internacia Junulara Kongreso** alproksimiĝas! Ne maltrafu la okazon sperti memorindajn momentojn en **Šventoji (Litovio)**, inter la **18-a kaj la 25-a de Aŭgusto**.

**KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko)** 2024 okazos de la **7-a ĝis la 10-a de Novembro** en **Žilina**, bela urbo en la nordo de **Slovakio**. La ĉi-jara ĉeftemo estas “Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo”.

**La esperantista junularo de Sudorienta Azio invitas vin partopreni en KUŜEJO**, kiu okazos en **Jogjakarto (Indonezio)**, de la **14-a de Novembro ĝis la 17-a de Novembro**! La evento estas okazo renkonti novajn amikojn el ĉiuj kulturoj de Sudorientazio!

La Germana Esperanto-Junularo invitas vin al la **33-a Kreema Esperanto-Kurso (KEKSO)**, kiu okazos **de la 29-a de Novembro ĝis la 1-a de Decembro** en **Nürnberg (Germanio)**. Tio estas evento por adoleskoj kaj junaj plenkreskuloj, kiuj ŝatus kune lerni kaj paroli Esperanton.

Venu festi novjaron en la tradicia junulara kunveno, sed ĉifoje neplu en Pollando nek Germanio, sed en **Belgio** (proksime de Lieĝo)! La oficiala programo ekos **la 27-an de Decembro ĝis la 2-a de Januaro 2025**. Jam eblas aliĝi, do jam pretiĝu por bonvenigi la novan jaron en mojosa etoso!

## Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!

Nia aŭguristino, kiu spertas pri okcidenta stelaŭgurado esploris la kosmajn energiojn kaj studis la movojn de la planedoj por ni: malkovru kion la universo rezervis por ni kaj kiel ĝi influos Julion por ĉiu signo de la zodiako!

♈ Julio superŝargos vian konkuradan spiriton, Ŝafo. Ĉu temas pri amika ludo de tabloteniso aŭ vetkuro al la fronto de la vico ĉe la kafejo, vi transformos ĉion en konkurson. Nur memoru, ke ne ĉiuj scias, ke ili batalas kontraŭ vi. Provu ne defii hazardajn fremdulojn al piedkurado — ili eble ne aprezos la surprizon.

♉ Ĉi-monate, Bovo, via amo por lukso atingos novan pinton. Vi malkovros novajn manierojn dorloti vin, de or-infuzitaj vizaĝmaskoj ĝis belaj piĵamoj. Nur estu zorgema kaj ne troigu — estas malgranda limo inter prizorgi vin mem kaj bezoni personan asistanton por mastrumi vian haŭtan prizorgon.

♊ Julio estos monato de scivolemo kaj esplorado, Ĝemeloj. Vi trovos vin starigante senfinajn demandojn kaj perdiĝante en Vikipedion je la dua matene. Dum via soifo por scio estas admirinda, provu ricevi iom da dormo. Neniu bezonas scii la tutan historion de kaŭĉukaj anasoj.

♋ Ĉi-julie, Kankro, via zorgema flanko brilos. Vi sentos nevenkeblan impulson zorgi pri ĉiu kaj ĉio, inkluzive de tiu velkanta planto, kiun vi nomis Fred. Nur memoru prizorgi vin mem ankaŭ. Fred povas postvivi kun iom malpli da akvo kaj multe malpli da emocia subteno.

♌ Julio malkaŝos la modfakulon kiu troviĝas en vi, Leono. Ĉiu tago estos podio, kaj ĉiu vesto estos ŝanco por brili. Ne surpriziĝu se vi komencas kunordigi vian superbarazan veston kun la koloro de viaj reuzeblaj sakoj. Nur memoru, memfido estas via plej bela juvelo — ĉio alia estas nur aldono.

♍ Ĉi-monate, Virgo, vi fariĝos majstro de memfaritaj projektoj. Ekde konstruado de via propra librobreto ĝis trikado de tuta vestaro, viaj manoj estos okupataj. Nur atentu — viaj amikoj eble ne bezonas personigitajn, manfaritajn subglasojn por ĉiu okazo. Sed hej, la penso gravas!

♎ Julio signifos sociumadon por vi, Pesilo. Vi fariĝos festoplanisto, ĉu temas pri virtuala rendevuo aŭ korta kradrostado. Nur provu ne nervoziĝi pri ĉiu

detalo — neniu rimarkos se la buŝtukoj ne kongruas kun la tablotukoj. Kaj se homoj rimarkas, ili verŝajne bezonas pli da manĝaĵoj.

♏ Ĉi-monate, Skorpio, viaj detektivaj kapabloj estos reliefigitaj. Vi malkovros sekretojn, solvos misterojn, kaj eble eĉ malkovros, kiu manĝis la tagmanĝon, kiun vi lasis ĉe la laborejo. Nur memoru, kun granda povo venas granda respondeco. Provu ne tro intense demandadi viajn kunlaborantojn — ili verŝajne nur pensis ke via sandviĉo estis ilia. Verŝajne.

♐ Julio malkaŝos vian filozofian flankon, Sagitario. Vi trovos vin pripensanta la grandajn demandojn, kiel “Kial ni estas ĉi tie?” kaj “Ĉu cerealaĵo estas supo?” Dum viaj profundaj pensoj estas fascinaj, provu ne tro perdiĝi en ili. Finfine, ankoraŭ estas kaj aventuroj por havi kaj cerealaĵoj por manĝi.

♑ Ĉi-monate, Kaprikorno, vi kreos farendaĵlistojn por viaj farendaĵlistoj kaj trovos novajn manierojn maksimumigi efikecon. Nur memoru, efikeco estas bonega, sed ankaŭ paŭzado. Provu plani iom da “mi-tempo” inter organizado de via ŝtrumpa tirkesto kaj alfabetizado de via fridujaĵoj.

♒ Julio vekos vian kreeman geniulon, Akvisto. Vi elpensos ideojn tiel novigajn, ke eĉ vi impresiĝos. Ĉu temas pri inventado de nova aparato aŭ komponado de avangarda simfonio, via kreemo ne konos limojn. Nur estu zorgema ne komenci tro multajn projektojn samtempe — Romo ne konstruiĝis en unu tago, kaj ankaŭ ne via epika tabulluda kolekto.

♓ Ĉi-monate, Fiŝoj, via empatio estos superŝargita. Vi sentos vin profunde konektita al ĉiu kaj ĉio, inkluzive de tiu vaganta kato, kiun vi vidis unufoje. Nur memoru, estas bone starigi limojn. Vi ne devas adopti ĉiun beston, kiun vi renkontas, sed se vi faros, almenaŭ certigu, ke ili havas belajn orelojn. Ĉio temas pri la estetiko.

---

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

# Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud, TEJO-~~volontuloj~~-aŭguristino
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2024 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno.

This email was sent to capiscuas@gmail.com
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands